



*Estrara Komunikilo EKO 2015-43 sendita el Budapeŝto, la 2an de oktobro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

## AMO-stipendioj por sproni la sudorientan regionon de Eŭropo

Ni jam anoncis en EKO 40 la AMO-seminaron 17, kiu okazos jarfine en la hungara urbo Eger, kadre de la Junulara Esperanto-Semajno (JES) tra kvar matenoj de la 28a ĝis la 31a de decembro. Ĝia temo estas 'Junigi la Komunumon' kaj celas aparte trovi volojn por fari tion en la sudorienta regiono de Eŭropo (projekto SORE). UEA proponos seson da stipendioj en valoro de €150 por mildigi la kostojn de partopreno en la seminario kaj JES kaj ankaŭ la vojaĝkostojn. La stipendioj estas malfermitaj al junuloj kaj junulgvidantoj en (alfabetorde) Albanio, Bulgario, Moldavio, Rumanio, Serbio, Ukrainio kaj pliaj landoj de tiu mondparto. La koncerna petilo estas nun distribuata en tiuj landoj. Pritema artikolo aperos en la novembra numero de revuo *Esperanto*, kiu prezentos sep kernajn diskutpunktojn por la seminarioj laboroj. Informoj kaj aliĝo al JES: <http://jes.pej.pl/2015/>. Bv indiki en la aliĝilo deziron partopreni la seminarion, tiel ke vi ricevu preparamaterialojn. Informoj pri la JES-ejo angle, germane, hungare kaj pole: <http://www.motelbotax.hu/pl/index.php>.

## EKO ne povas tiom ofte eki

Kiom tumultas la viv'. Jam ne plu eblas doni la kompletigajn informojn promesitajn en EKO 42 pri TORPEDO 10 kaj la skajpaj prelegoj por la Eŭropa Tago de lingvoj. Ni bondeziras al tiu ĉiujara trejna renkontiĝo por instruistoj en Herzberg, kaj al la entreprenemo de <edukado.net>.



## Krynica festas kvaronan jarcenton

Ankaŭ ĉi-septembre, la dekan jaron sinsekve, Esperanto estis prezentita dum la Ekonomia forumo en Krynica-Zdrój (Pollando), kiun partoprenis ĉ. tri mil politikistoj, ekonomoj, ĵurnalistoj, artistoj. EEU aranĝis Esperanto-standon, (vidu foton sur la sekva paĝo) kaj la muzika grupo "Junaj Voĉoj" kantis en Esperanto por la partoprenantoj (vidu la foton sekvapaĝe).

Legu pli en "La Ondo de Esperanto" kaj en la novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/2015/09/krynica/>. Pri la pasintjara evento kaj la partopreno de UEA, vidu en EKO 2014/42.

UEA estis reprezentita en la forumo, ĉi-foje per la estraranino Barbara Pietrzak. Jen resumo el ŝia raporto:

"La nunjara Ekonomia Forumo (08-10.09.2015) pasis sub la devizo „Kiel konstrui fortan Eŭropon? Strategioj por la estonteco". Dank' al la personaj kontaktoj de Halina Komar kun la ĉeforganizanto de la aranĝo kaj la organiza streĉo de Eŭropa E-Unio esperantista partopreno signiĝis per aparta informstando dum la jam 25-a forumo. EEU, subtenita finance de i.a. UEA kaj ESF, estis la unusola neregistara

organizo inter la dekoj da entreprenistoj kaj firmaoj. Estis antaŭvidita podia diskuto, kiun esperantistoj organizis jam plurajn fojojn, sed tio forfalis pro jubileaj premioj. [...] La lingvaj aspektoj de kunlaboro inter la ŝtatoj apenaŭ signiĝis en la forumaj diskutoj. Multaj el la podiaj diskutoj estis dominitaj de la aktuala temo, la enmigra situacio en Eŭropo. La E-stando disponis pri riĉa, alloga kaj freŝa varbmaterio tute aparte preparita por ĝi kaj lige kun la Nitra UK. Multaj homoj petis informmaterialojn kaj kontakteblojn en diversaj urboj kaj landoj. Ĝi estis situanta vid-al-vide al unu el la diskutsalonoj do daŭre preterpasis ĝin novaj forumanoj. Verdire apenaŭ estis momento sen haltoj kaj alparoloj, demandoj. [...] Ĝenerale mi opinias nian partoprenon en la nunjara Ekonomia Forumo tre grava, kion sekvis la jam vortumita invito de la ĉeforganizanto Z. Berdychowski por esperantista partopreno en la sekva Forumo en 2016.



Maldekstre: La stando kun deĵorantoj. Dekstre: La junaj voĉoj aŭdigas Esperanton al forumanoj.



## Salutletero de UEA al la kursara kunveno en la poznana universitato

Kara Ilona, karaj instruistoj kaj studentoj de la Interlingvistikaj Studoj,

nome de la estraroj de UEA kaj ESF, mi salutas kaj gratulas vin okaze de la nova studsesio en Poznano. Ni tre alte taksas la valoron de via programo, kiu havas grandan edukan kaj strategian signifon por nia tutmonda movado. Ni ankaŭ aprezas vian pretecon investi tempon, monon kaj energion en ĉi tiu studkampo, kiu ankoraŭ ne havas tian prestighon kaj rekonon en akademiecaj medioj, kian ĝi meritas. Niaflanke, ni estas feliĉaj povi subteni la programon ne nur morale sed ankaŭ finance, per propraj rimedoj kaj per la donacoj de niaj membroj kaj subtenantoj, sub la devizo "Amu Poznanon!" La nuna semajno certe estos multlilate kleriga kaj kulture riĉiga, kaj do meritos la amon de ni ĉiuj. Mi deziras al vi ĉiuj ĝoj- kaj pens-plenajn tagojn en Poznano!

Elkore kaj bondezire,

Mark Fettes  
Prezidanto, Universala Esperanto-Asocio  
Estrarano, Esperantic Studies Foundation

## Estrarano Lee en Indonezio prepare al Kongreso 2016

Raportas Lee Jungkee: 'Hodiaŭ en la 26-a de septembro, 2015, mi renkontis esperantiston s-ron Pande Sri Santhakumara, kiu loĝas en Bali, Indonezio (vidu la foton sur la sekva paĝo). Antaŭ mia vojaĝo mi akiris informon pri Pande de s-ino Ilia, prezidantino de Indonezia Esperanto-Asocio, kiu aliĝis al UEA en la Lilla komitata kunsido. S-ro Pande instruas matematikon angle en sia elementa lernejo. Mi tuj rimarkis, ke li estas tre talenta je lingvo. Li havas planon instrui Esperanton al 15 balianoj. Mi forte rekomendis aliĝon al la Seula UK en 2017 kun liaj kursanoj. Vidu foton pri la renkontiĝo el la PDF-versio de nia

komuniko. Ni renkontiĝos en La Trilanda Kongreso de Esperanto (Aŭstralio, Nov-Zelando kaj Indonezio), kiu okazos en la urbo Bandung, Indonezio, en la sekvontjara marto (23-28). Adiaŭante lin, mi donacis Esperanto-legaĵojn.



TRILANDA KONGRESO DE ESPERANTO KAJ SOMERKURSO  
**BANDUNG, INDONEZIO**  
23-28 MARTO 2016



Aŭstralio, Nov-Zelando kaj Indonezio kunvenos! Venu kaj ĝuu programon de Esperanto-klasoj, ekskursoj, prelegoj, amuzajo kaj pli!



**Specialaj Gastoj:**  
Lee Jungkee & Jonny M



Lernu pli kaj aliĝu ĉe:  
[aea.esperanto.org.au](http://aea.esperanto.org.au)

Deko da pliaj eroj ne sukcesis eniri ĉi tiun komunikon.

Mi esperas krei komunikon 44 el Ukrainio.

SMG: Vortoj: 820

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al:  
[http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado\\_kun\\_LA,\\_FA...](http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...)